


starto

ELDONAS ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



1981 · 4 · (86)



HALTU POR MOMENTO KAJ PENSU PRI VIA SANO

De tago al tago, de jaro al jaro vi senĉese ion kaptas, ĝis maksimumo streĉante la risorton de via sano. Kiel longe vi volas ankoraŭ toleri tion? Pripensu, ke vi havas nur unu sanon — kaj ebligu al ĝi por tre modera prezo tion, kion ĝi meritas: la kompleksan kuracadon en unu el la plej antikvaj kaj rekonataj banlokoj de Eŭropo.

ĈEĤOSLOVAKAJ BANLOKOJ
— oazoj de sano, trankvilo kaj inspiro —

KARLOVY VARY - FRANTIŠKOVY LÁZNĚ - MARIÁNSKÉ
LÁZNĚ - JÁCHYMOV - TEPLICE V ČECHÁCH
PODĚBRADY - JANSKÉ LÁZNĚ - TŘEBOŇ - JESENÍK
LUHAČOVICE - TEPLICE NAD BEČVOU

BALNEA *

Reprezentanto de ĉeĥoslovakaj banlokoj kaj kurac-fontoj.
PAŘÍŽSKÁ TRÍDA 11, 110 01 PRAHA 1, ČEĤOSLOVAKIO
Tx: 122 215



1981 LA INTERNACIA JARO DE HANDIKAPITOJ

Almenaŭ 500 milionoj da homoj en la mondo estas handikapitaj, sed la internacia socio nur ekkomencis atentigi la publikon pri iliaj situacio kaj malfacilaĵoj. Ĉi tiun jaron, 1981, la Ĝenerala Asembleo de la Unuiĝintaj Nacioj nomis La Internacia Jaro de Handikapitoj kun la celo veki la mondan konscion pri tiu komplika problemoj.

Jam ĉe la difino de handikapiteco komenciĝas la komplikeco. Kiel difini ĝin? Ĉu temas nur pri evidentaj fizikaj aŭ mensaj malhelpoj? Ĉu oni ankaŭ konsideru internajn fiziologiajn malfacilaĵojn? Alia demando estas la severo de la handikapo.

"Unu el la celoj," diris Ambasadoro Mansour Kikhia, Prezidanto de la Organiza Komitato de la Jaro, "estas atingi internacian interkonsenton pri kio estas handikapiteco."

Jam inter la evoluantaj kaj evoluantaj landoj de la mondo komenciĝis diskutoj, kunvenoj kaj interŝanĝoj de spertoj por starigi interkulturan kaj internacian difinon surbaze de komparado de leĝoj kaj praktikoj. Kvankam ties formo estas ankoraŭ ne certa, oni povas antaŭvidi ke formiĝos ia internacia normo pri tiu ĉi demando. Kiel Ambasadoro Kikhia diris, "la jaro ne estas celo en si mem."

Kvankam la handikapitoj frontas problemojn en ĉiu parto de la mondo, iliaj problemoj malsamas de unu lando al alia. Unu komuna problemoj estas, tamen, ilia integriĝo en la socion. En la evoluantaj landoj, sociaj servoj estas multaj kaj taŭgaj sed ofte audiĝas plendoj pri la "anonima" kaj "automata" traktado. En la evoluantaj landoj, aliflanke, la familio estas ankoraŭ forta, sed terure mankas necesaj sociaj servoj. "La prava solvo troviĝas versajne en la mezo," sugestas Ambasadoro Kikhia. "Ni bezonas sociajn servojn, sed ni ankaŭ devas eduki la familion, eduki la handikapitojn mem, kaj eduki iliajn familianojn pri tio, kiel helpi ilin estiĝi efikaj anoj de la socio."

La komitato havas ankaŭ aliajn gravajn zorgojn. Ĝi okupiĝas, en kunlaboro kun la Monda Organizo pri Sano, pri metodoj por redukti handikapigon pro malsano, akcidentoj kaj hereditaj difektoj. Ĝi laboras por kolekti financon helpon el registaraj kaj neregistaraj fontoj. Krome ĝi faras sian eblon rekte helpi al la unuopaj registaroj kunordigi kaj evoluigi siajn servojn por handikapitoj por atingi plej efikajn kaj humanajn rezultojn.

Por pliaj informoj oni turnu sin en Esperanto al la adreso de UEA en Novjorko: Esperantic Studies Foundation, 777 United Nations Plaza, New York, NY 10017 USA. — Aperigante niajn komunikojn, vi farus al ni grandan komplezon se vi povus indiki la fakton, ke ili fontas el la Novjorka oficejo de UEA, kaj alvoki viajn legantojn helpi tiun oficejon per kontribuoj al la Fondaĵo UN /Unesko de UEA aŭ per tio, ke ili fariĝu Amikoj de la Oficejo de UN /\$ 100 por Subtenantoj, \$ 10 por ordinara membro de la Amikaro/. Donacojn oni povas sendi aŭ al perantoj de UEA aŭ senpere al la adreso en Novjorko.

U E A

Esperantaj manuskriptoj de ĉefaj aŭtoroj

En Starto 1980 /4/ mi publikigis informon pri la eldonota "Bibliografio 1890 - 1980", kiu listis libroforme aperintajn verkojn en Esperanto /dum la indikita tempoperiodo/ en la ĉefaj landoj. Krom tiuj ĉi eldonitaj verkoj restis pluraj aliaj en manuskripto. Surbaze de miaj esploroj mi volas konatigi la legantaron de Starto pri la kompilita listo de manuskriptoj, kiuj atendas eventualan eldonon. Mi konscias, ke la listo ne estas kompleta kaj volonte akceptos ĉiujn informojn, kiuj povos kompletigi kartotekon de la manuskriptoj /aŭtoro, nomo de la verko, tradukinto, loko kie troviĝas la manuskripto, aliaj gravaj indikoj/. La laŭeble kompleta listo de manuskriptoj estos grava informfonto ne nur por la tradukantoj, sed ankaŭ por la eldon-komisiono de ĈEA ĉe decido pri la 5-jara eldona plano. Antaŭdankon pro la kunlaboro!

V. Novobilský, Školní 5 40001 Ústí n.L.

I. Manuskriptoj de tradukitaj prozaj verkoj /parenteze estas indikita la tradukinto/

Čapek Karel: Krakatit /F. Vaněk/
Devatero pohádek /J. Vondroušek/
Válka s mloky /J. Vondroušek, parte d-ro T. Pumpr/
Věc Makropulos /J. Vondroušek/
Matka /E. Seemannová/
Dyk V.: Ondřej a drak /J. Vondroušek/
Galuška M.: Stařeček Pagáč vypravují /V. Trojan/
Hašek J.: Povídky /V. Vána/
Hausmann: Dánové v Praze /V. Vána/
Jirásek A.: Skaláci /M. Bartovská/
Staré pověsti české /J. Vondroušek, nekompleta/
Jirotka Z.: Saturnin /J. Vondroušek/
Kudeřková M.: Zlomky života /EK Gottwaldov/
Mrštík V. kaj A.: Maryša /E. Seemannová/
Otčenášek J.: Když v ráji přišlo /V. Pechoč, nekompleta/
Poláček K.: Jáchym a příbuzenstvo /V. Vána/
Kompenzační obchod /V. Vána/
Vančura V.: Obrazy z dějin národa českého /V. Pechoč/
Vlastní životopis Karla IV. /J. Vondroušek/

II. Manuskriptoj de tradukitaj poeziaj verkoj

Mácha K.H.: Máj /T. Pumpr, reviziita de J. Kořínek/
Nezval V.: Manon Lescaut /J. Kořínek/
Dnes ještě zapadá slunce nad Atlantidou /S. Kamaryt/
Rais K.V.: Zvířátka a lidé /J. Kořínek/
Seifert J.: Píseň o Viktorce /J. Kořínek/
Vějíř Boženy Němcové /J. Kořínek/
Věneček sonetů /J. Kořínek/
Karen J.: Hledání modrého tónu /J. Kořínek/

III. Manuskriptoj de originala Esperanta prozo

Omelka F.: La granda admiralo. Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo /romano/.

Urban Š.: Taglibro de esperantisto
Noveloj
Don Q de 1' espero /satira Esperanto-aventuro/

IV. Manuskriptoj de originala Esperanta poezio

Kořínek J.: Poemoj
Doktoro Zamenhof /poemego honore al la 40a datreveno de la morto/
Pič K.: Fabeloj el Transe
Ekkrioj al Georgina
Ismoj, ismoj
La Davida Harpo
Urban Š.: Rondeloj
Kolumbiado /satiro en versoj/
La serĉado /versciklo/
Tra 1' pordotruo /trioletoj/
Hirtaj kantoj
Hajkoj neĵapanaj /ŝercaro/
Eĥoj de popolkantoj ĉeĥoslovakaj
Urbanová E.: Poemoj

el fervojista movado

Prihlaška do sekce železničářů ČES

Před několika lety vyplňovali členové sekce přihlášku do sekce a členskou kartu. Protože je tato evidence zastaralá, prosíme všechny zájemce o sdělení zda chtějí být členy sekce nadále. Stačí v dopise nebo na korespondenčním lístku uvést jméno a příjmení, datum narození, adresu bydliště, zaměstnání a služebnu, znalost esperanta /začátečník, pokročilý, učitel/, členství v místní skupině a v čem chcete pomáhat. Svou zprávu zašlete na adresu ČES. Nemůžeme platit žádné další členské příspěvky, stačí členství v ČES. Chceme mít pouze nový přehled o stavu členské základny sekce a mít se všemi členy styk.

NOMENKLATURA KOMISIONO de Fervojista sekcio de ĈEA

Penetrado de scienco kaj tekniko en nian vivon pliriĝigas nian lingvon je fakaj terminoj, kiuj nepre signifas ankaŭ kompletigon de la Internacia lingvo. Dum lastaj jaroj unuopaj esperantistoj kreis fakajn vortaretojn. Fervojistajn terminojn pristudis ekz. s-ano Roshier, kiu en la jaro 1953 eldonis la vortareton de multaj bazaj fervojistaj terminoj. Kreado de fakaj fervojistaj vortoj kaj terminoj ricevis organizitan bazon per kreo de terminara komisiono en la kadro de IFEF - Internacia Fervojista Esperanto-Federacio. La komisiono transprenis la taskon traduki en Esperanton seelingvan

fervojan vortaron eldonitan de UIC - Internacia Fervojunio. En tiu ĉi komisiono laboras ankaŭ grupo ĉs.fervojistoj, kiuj sukcese plenumis ricevitan taskon - traduki la terminojn de literoj F - G de la vortaro UIC. Ĉs. fervojistoj kunlaboras ankaŭ en la preparaj laboroj de vortaro por uzo de niaj fervojistoj. Ankaŭ tie la laboro sukcesas kaj nun estas en stadio de selektado kaj preparo de manuskripto.

Sed ĉe la fervojo estas diversaj fakaj grupoj, kiuj havas siajn apartajn terminojn. Dum jaroj nia komisiono perdis plurajn fakulojn kaj nun ĝi disponas sole pri laboruloj en trafiko, transporto kaj fervojlinia ekonomio. Ĉiuj ceteraj fakaj grupoj ĉe la fervojo ekzistantaj kaj ili estas ne malmultaj, mankas. Multon oni trovas en normoj, kompendioj kaj vortaroj. Tamen la plej grava estas helpo de sperta fakulo en koncerna sfero. Helpu al ni do finlabori fakan vortaron per prijuĝo de ĉeĥaj terminaj proponoj. Bv. uzi la adreson:

Jaroslav D a v i d, 742 43 Studénka 5 - Pustějov 190

Faka helpo ebligas al ni sukcese fini la ĝisnunan laboron. Fakajn terminojn en Esperanto prilaboras reprezentantoj el 14 landoj kaj el pluraj fakgrupoj. Ekzistas do la garantio de plej granda objektiveco por fiksi fakan vorton. Laŭ la sukceso de ĝisnuna laboro ekzistas espero, ke venonta eldono de UIC-vortaro enhavos ankaŭ esperantan version.

Jak jste jistě pozorně četli ve výše uvedeném článku, má názvoslovná komise před sebou větší plány. Pro jejich splnění potřebujeme také Vaši spolupráci. Proto hledáme železničáře - esperantisty všech železničních oborů pro spolupráci ve vydávání odborných slovníků.

Složení komise je po odborné stránce: doprava, přeprava a traťové hospodářství. Ostatní obory nejsou zastoupeny, proto uvítáme každou pomoc a spolupráci ve všech dalších železn. oborech jako např. zabezp. zařízení, vozová služba, trakce apod. Velmi hledáme odborníky na recenzi českého znění na souhrnných esper. listech. Bližší informace podá vedoucí komise, jehož adresa je uvedena v esper. textu článku.

34-a KONGRESO DE IFEF VIN VOKAS

V roce 1982 od 2. do 8. května se v maďarském lázeňském městě Balatonfüred sejdou esperantisté - železničáři z celého světa na svém sjezdu. Železničářská sekce ČES se již dnes připravuje na tento sjezd a požádala cestovní kancelář IBUSZ o spolupráci. Podle předběžné odpovědi IBUSZ je ochoten nám zájezd zajistit. V ceně by byl zahrnut kongresový poplatek, celodenní výlety a ubytování včetně stravy. Dnes ještě není možné uvést cenu, ale rozhodně bude pro účastníka výhodnější cestovat přes turistickou kancelář než ze soukromého přídeľu valut. Proto neváhejte! Již dnes je možné na kongres se přihlásit. Stačí kor. lístek, který bude mít Vaši předobjednávku. Odešlete jej na adresu svazu. Pak budete zařazeni do seznamu a během druhého pololetí dostanete závaznou přihlášku.

Dohoda mezi IFEF a ČES



Zásadní rozhodnutí přijali účastníci jednání o současné situaci v železničářském hnutí dne 6.8.1981. Po vysvětlení stanovisek byla podepsána dohoda v tom smyslu, že IFEF bude jednat pouze s reprezentanty českého a slovenského železničářského hnutí, organizovaného v rámci obou esperantských svazů. Předseda svazu Mezinárodní federace železničářů/IFEF/ pan Giessner vyslovil politování nad situací, které u nás vznikla a zároveň zájem podporovat českou a slovenskou esperantskou sekci železničářů. Reprezentant t.zv. Československé železničářské federace s-ano Blažek souhlasil ukončit veškerou další činnost této skupiny. Zástupci ČES znovu ujistili, že mají zájem na dobrých vztazích s IFEF a že ti železničáři-esperantisté, kteří byli jednáním dřívějšího iniciátora této skupiny J. Kollárem pomýleni mají kdykoliv možnost se zapojit do práce železničářské sekce ČES.

Na fotografii pan Giessner/ první zleva/, dále zleva doprava Dr. Jermář/předseda ČES/, Babička/zástupce SZ ČES/ a Blažek Miloslav vedoucí t.zv. Československé železničářské esperantské federace při jednání. Zároveň pozvali zástupci ČES předsedu IFEF s-ano Giessnera, aby se zúčastnil jako host sjezdu ČES na jaře 1982. Pozvání bylo přijato.

SET Lančov ĝanĝas sian vizaĝon / vidu la foton sur la kovril-pago de tiuĉi Starto/ dank al herco, libervola, preĝkau ĉiutaga laboro de multaj klubanoj el Třebíč kaj dank al grando, stata, financa subvencio. Estontjare ni planas jam akcepti fremdlandanojn pere de nia vejagegantejo REKREA Praha.

ni recenzas

RIPORTO SKRIBITA EN LA PENDUMILA MAŜO



JULIUS
FUČÍK

Julius Fučík, Ripoŝo skribita en la pendumila maŝo - Trad. E. Hromádka, revizi-
kaj komplet. V. Novobilský kaj O. Knichol.
Eld. Panoramo en Prago, 1979.

El recenzo pri RIPORTO...

La nomo de Julius Fučík famiĝis tra la tuta mondo. Eĉ ekstere de ĈSSR oni nomis laŭ li stratojn kaj placojn /ekz. en Dresden/ En kio do estas la grando de tiu viro? Kiaj estas la kaŭzoj de lia famo?

En "Ripoŝo" la leganto trovos - krom redaktaj informoj pri la persono, vivo kaj agado de Fučík - viglan, temperamentan kaj tamen precizan raporton pri liaj travivaĵoj en la GESTAPO-malliberejo de Pankrác /Prago/ printempe 1943, pri la cirkonstancoj de la arestado de li kaj de multaj el liaj kunbatalintoj kaj pri la konduto kaj sinteno de kunkaptitoj, gardistoj kaj naziaj funkcio-uloj. Sed krome kaj ĉefe, la leganto trovas homon de eksterordinara anima grando, homon, kiu malgraŭ la minacata morto, malgraŭ torturoj kaj ĉiuspecaj malhelpaĵoj konservas sian homecon, konservas sian varman inklinton al la homoj kaj al la vivo, trovas eĉ la korpan kaj animan fortan observi sian ĉirkaŭaĵon, memori pri homoj kaj okazintaĵoj ekster kaj en la malliberejo, trapasei konektojn kaj homajn karakterojn kaj helpe de riskopreta ĉefa gardisto surpaperigi ĉion ĉi.

La impresita recenzinto desiras al la Esperanto-eldono de tiu elstara dokumenta verko varman akcepton flanko de la internacia esperantistaro, des pli, ĉar la tradukinto kaj reviziintoj prezentas ĝin en flua, facile legebla lingvaĵo.

D-ro Karl Schulze,
Berlin


F O N T O . Tia estas la titolo de nova, ilustrita literatura gazeto en Esperanto, aperanta de 1980 en Brazilo. Pri ĝia alta nivelo garantias la redaktoro William Auld, literaturisto kaj prezidanto de la Akademio de Esperanto. En la unuaj tri numeroj estas ankaŭ ĉeĥoslovakaj aŭtoroj aŭ tradukantoj: Kořínek, Kníchal, Karen, Pič, Jakubcová, Mařík. La jarabono estas 12 us.dol. aŭ egalvaloro. Detalojn pri abono: Alfredo BAYS, Caixa Postal 49; BR 89800 CHAPECÓ - SC, Brazilo.

/jlm/

LA MORTO KAJ LA KURACISTO. A halál és az orvos. De Heltai Jenő. El la hungara Ladielao Somlai. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝto 1981. Kajereto kun 18 paĝoj, formato 19,5 x 15 cm, prezentas al ni rakonton paralele en hungara lingvo sur la paraj paĝoj kaj en Esperanto sur la malparaj paĝoj. En fantazia rakontaĵo ni travivas la morton de lia moŝto Morto savota de la fama kuracisto D-ro Morbidus. Kelkaj filozofiaj pripensoj donas al la simpla rakonto certan valoron. La lingvaĵo estas senripoĉa kaj sena de preseraroj. Uzebla por kursoj, precipe por hungaroj pro la apudstaraj tekstoj.

Jiří Kořínek

TURISMA MONDO



○ Per turismo al la mondpaco

/IV-a Internacia Turisma Renkontiĝo de Ercmontaraj Esperantistoj en Merklín apud Karlovy Vary 1981/06/12-17/

Tridek naŭ gesemideanoj el GDR, Hungario, Pollando kaj ĈSSR kunvenis en pitoreska valo de la urbeto Merklín apud Karlovy Vary. Jam tradician kvintagan turisman renkontiĝon preparis loka grupo de ĈEA en Karlovy Vary. Inaŭgura parolado de J. Klement tuŝis la 60-jaran jubileon de KPC kaj de la organizita laborista Esperanto-movado, kiuj precipe en la regiono Karlovy Vary havas riĉan internacian tradicion. La grupestro emfazis la plej gravan nuntempan taskon - defendon kaj konservadon de la daŭra mondpaco. Ankaŭ la kultura programo estis direktita al tiu ĉi grava celg: en ĝi premieris esperantlingva mozaiko el la elstara kontraŭmilita verko de Karel Čapek "La Patrino". Poste ĉiuj partoprenantoj kaj gastoj subskribis la pacdefendan rezolucion.

Specialan dankon reprezentantoj de la loka organizaĵo de kontraŭfaŝismaj batalantoj en Ostrov k-do Hájek pro la prelego pri iama koncentrejo kaj k-do Štěpánek, kiu informis pri la socialisma vivo en Ostrov. Reprezentanto de esperantistoj el GDR s-ano Rudolf Eichler ĉe fino de la renkontiĝo invitis ĉiujn partoprenintojn al la V-a Internacia Turisma Renkontiĝo de Ercmontaraj Esperantistoj okazonta la 4-10an de oktobro 1982 en Schwarzenberg en GDR.

Jar. Klement

○ Feriado de esperantistoj en la montaro Šumava

Dum pluraj jaroj esperantistoj de kultura klubo JITEK en Písek strebis plibonigi siajn lingvosciojn per praktika uzado de la lingvo kun eksterlandanoj dum turismaj semajnoj en sindikalistaj kabanoj Chrástov aŭ Nová Huť.

Nun ni sukcesis trovi alian eblecon-komfortan tute novan feriumejon de sindikalistoj el FEZKO Strakonice ĉe vilaĝeto Benešova Hora /komunumo Vacov/. La feriumado de esperantistoj tie komen-
ciĝas dimanĉe la 23-an de aŭgusto vespere, ĉar dum anticipa sabato kaj dimanĉo oni planas amasan partoprenon je renkontiĝo de esperantistoj en Příbram. La esp.feriado tie daŭros ĝis sabato la 29-an de aŭgusto 1981. Partoprenantoj pagos tie po 50 Kčs tage kaj tiu ĉi prezo inkluzivas loĝadon en 3 - 5 litaj ĉambroj, bonkvalitan manganon 3x tage, uzadon de ĉiuj instalaĵoj en la feriumejo /ankaŭ televidon/ kaj ĉiujn programojn. Nur vojaĝbiletojn devos pagi ĉiu unuope. Esperantistoj organizos tie ĉiutagejn turismajn ekskursojn, sed partopreno ne estas deviga. Krome en la ĉirkaŭaĵo oni povas trovi multajn fungojn, vakciniojn ktp. Du publikaj banejoj situas en distanco 1 kaj 3 km. Ĉiu aliginto ricevos pli detalajn instrukciojn kiel atingi la lokon

Aliĝi oni povas per simpla poŝtkarto ĉe s-ano Libor Křivánek, Zborovská 1332, 397 01 Písek.

○ La brava soldato ŜVEJK kaj Esperanto

Turisma organizaĵo de JITEK en Písek jam 15 jarojn eluzis popularecon de Ŝvejk per nomo de popularaj amasaj piediroj. Kutime partoprenis ĉirkaŭ 4000 ĝis 7000 turistoj el tuta Ĉeĥoslovakio, sed niam eksterlandanoj. Tiun ĉi jaron por la unua fojo eksterlandanoj estis varbitaj - pere de Esperanto. La oficialan programon pliriĉigis membroj de Esp.rondeto "La ponto" ĉe kultura klubo de JITEK per ŝipa ekskurso al Zvíkov kaj Orlik, esperantolingva prelego pri Ĉeĥoslovakio kun projekciaj diapozitivoj kaj precipe per publika prezento de la romano pri Ŝvejk en Esperanto.

Libor Křivánek

○ La lokaj grupoj por ESPERANTO en turismo

Ĉiujn ĝojigis la sciigo pri la grava sukceso dum la Unua tutmonda konferenco pri turismo en Manila, kiam en la fina deklaro estis rekomendite lerni fremdajn lingvojn, precipe Esperanton.

Bedaŭrinde, sen praktika apliko ĉi tiu atingo estus vana kaj nenio ŝanĝigus. La anoncita komenco de kunlaboro de ĈEA kun niaj turismaj organizaĵoj estas de baza signifo por nia plua laboro. Kiaj estos la sekvaj paŝoj? Certe, neniuj povas diri precize. Sed ni, la lokaj grupoj, devas esti tamen preparitaj.

Niaopinie la unua tasko de la lokaj grupoj estu: kolekti konvenajn broŝurojn kaj foliojn pri vidindaĵoj kaj memorindaĵoj en la distrikto, esperantigi la tekstojn. Kvankam verŝajne en la nove eldonata broŝuro la teksto estos iom ŝanĝita, estus bone prepari tradukojn de la nun ekzistantaj tekstoj, ĉar ĉe ĉiu memorindaĵo aperas specialaj terminoj/historiaj/, kiujn oni nur malfacile povos traduki/nur post relative longa pritraktado kun lingvaj fakuloj/. La eventuale eldonota nova teksto poste estos jam facile adaptebla.

En ĉi tiu agado tre utilis la regionaj organoj de ĈEA. /En nia loka grupo Roudnice n.L. estis kunvokita speciala kunveno pri tiu temo, kaj la taskoj estis jam dividitaj./

-jl-

Rimarkoj de nia redakcio

Certe gravas prepari diversajn tradukojn de la prospektoj. Tamen plejgrava nun estas proponi kaj tuj informi nian asocion/konvenajn turismajn kaj kulturajn aranĝojn por 1982 kaj pliaj jaroj. Tiujn aranĝojn povos poste asocio oferti pere de niaj turismaj agentejoj el eksterlandanoj kaj fakte komenci plenumadi rezultojn de la Monda Konferenco pri Turismo en Manila.

Sama asocio bezonas, ke aligu tiujn niajn membrojn, kiuj bone regas lingvon Esperanto kaj ankoraŭ almenaŭ unu internacia/rusa/germana/angla/franca/hispana/ktp/. Tiuj poste preparigos en specialaj seminarioj kiel oficialaj turistgvidantoj. Pliajn informojn donos nia asocio, turisma komisiono.

KDS

Sedlčany

KVALITAJ TRANĈ-PRODUKTOJ

Kuirejaj kaj viandistaj tranciloj ĝardenistaj tondiloj de diversaj tipoj

tondiloj por la kureja prilaboro de kortbirdoj

higiena ilaro - ungo-fajliletoj

- raspiletoj por la malmola haŭto

Fabrikas KDS SEDLČANY

Ekspertas MERKURIA

ČSSR Praha

internacia panoramo

ESPERANTO - ASOCIO EN GDR

Ja estas vaste konata, ke en Germana Demokratia Respubliko ekde 1965 aktive kaj celkonscie agadas esperantistoj en la kadro de la prestiĝa kulturasocio "Kulturligo de GDR". La centra gvidorgano de la esperantistaro estis Centra Laborrondo Esperanto, CLE, kiu 1976 fariĝis kolektiva membro de UEA. Tamen, ne malofte la GDR-esperantistoj konstatis, ke en eksterlando oni tute ne bone komprenis, kio estas tiu "Centra Laborrondo", ĉu asocio, ĉu centra organo, ĉu provizora kolektivo? Inter alie por forigi tiujn miskomprenojn kaj krei strukturon, kiu respondas al la internacie kutimaj, la prezidio de Kulturligo de GDR decidis dum majo 1981 ŝanĝi Centran Laborrondon en "Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR". La 46 membrojn de centra estraro de la nova asocio elektis en sekreta balotado la 170 delegitoj de la IIIa Centra Konferenco de la Esperantistoj en Kulturligo de GDR, kiu okazis la 23.-24.majo 1981 en Karl-Marx-Stadt. La konferencon entute partoprenis 190 esperantistoj el GDR kaj 20 eksterlandaj gastoj el Bulgario, ĈSSR, Hungario, Pollando, Rumanio kaj Sovetunio. Universalan Esperanto-Asocion reprezentis ties vicprezidanto d-ro Renato Corsetti, Italio. Plue partoprenis s-ino Anna Brennan, Anglio.

La fondo de la asocio ne nur estis simpla formala akto. Ĝi indikas la atingon de certa respektinda nivelo de la laboro kaj markas novan etapon. Tio reflektigas i.a. en la novaj Gvidprincipoj por la agado de la Esperanto-Asocio, kiujn la delegitoj akceptis. En ĝi oni, ekzemple, mencias unuan fojon i.a. la neceson de interlingvistika/esperantologia kaj sciencaplika agado.

Prezidanto de Esperanto-Asocio de GDR elektiĝis Hans Heinel, Rudolf Hahlbohm fariĝis vicprezidanto kaj d-ro Detlev Blanke, sekciestro por Esperanto en Kulturligo, estas la sekretario de la asocio. Al la prezidio plue apartenas Manfred Arnold, Jürgen Hamann, Linde Knöschke, Michael Lennartz, Siefried Linke, Werner Pfennig.

La konferenco havis altnivelan enhavon. 24paĝa priagada raporto resumis la faritan laboron post la Ila Centra Konferenco 1976 en Leipzig, kiun ankoraŭ partoprenis la prezidanto de CLE komerca konsilisto Rudi Graetz. En ĉefreferaĵo kaj 16 diskutkontribuoj en la du plenkunsidoj kaj ĉirkaŭ 50 pliaj en 4 laborgrupoj la konferenco donis riĉan superrigardon pri la atingitaĵoj kaj farenadaĵoj. Gravan pliriĉigon al la programo donis la eksterlandaj gastoj per siaj salutvortoj kaj prelegoj. Dum la kulturprogramo de la konferenco kantis la bulgara kantistino Maria Angelova.

Pri la konferenco abunde raportis la gazetaro de GDR i.a. la partia ĉeforgano "Neues Deutschland".

La delegitoj kunprenis hejmen impresojn kaj ekkonojn stimulgajn por la nova agadperiodo.

La komuna 75-jara jubileo de Sveda Esperanto - Federacio kaj de Klubo Esperantista de Malmö 5 - 8 de junio 1981

Kun la edzino ni havis la honoron partopreni la menciitan jubilean kongreson de SEF kaj de KEM en Malmö. Oficiale mi reprezentis la movadon de nia ŝtato kaj en la nomo de ambaŭ niaj asocioj salutis inter eksterlandaj delegitoj aŭ gastoj pli ol 200 geesperantistojn el ĉiuj svedaj provincoj. Impone impresis ankaŭ la transdono de la donacoj: artvitraĵa kolekto de ĈEA kaj naciarta belege cizelita kaj ornamita hakilo /valaŝka/ de AE SSR.

Dum la modele preparita SEF-kongreso en la Hejmo de maristoj en Malmö pere de la Klubo Esperantista bunta programo certe kontentigis ĉiujn. Oficialaj traktadoj komenciĝis per salutvortoj de la vicurbestro de Malmö s-ro Arne Lundberg, kiu samtempe anoncis la nomigon de unua strato en Svedlando Esperanto-gatan en Malmö. Tre gravaj kaj instruaj estis kontribuadoj de docento d-ro Ebbe Vilborg el Gotenburgo "La angla aŭ Esperanto" kaj de lektoro de la universitato en Genevo Claude Piron "Problemoj en internacia lingva komunikado". Cetere tuta programo, ĉu oficiala aŭ amuzamantis plenan atenton kaj kontentigis certe ĉiujn. Menciinda estas eble unua ligna kongresa insigno kun brulsignitaj nomoj kaj bezonaj datoj por ĉiu kongresano /artaĵo de instr.M. Markheden/. Ne mankis ankaŭ la kongresa poŝtstampo.

Feliĉe mi povis ankaŭ trakti ne sole kun reprezentantoj de Sveda Eldona Societo pri eventualaj interŝanĝoj de libroj kaj

ceteraj esp.materialoj, sed same kun tiuj de Esperanto - Centro en Århus, Danlando.

En belega propraĵo de KEM - luksa klubejo kun aldonaj ĉambroj lastan vesperon de nia restado dum la prelego en plenplena salono mi havis la eblecon informi pri la ŝtato de nia movado kaj ĝiaj porpacaj celoj, sed ankaŭ respeguligi ĉiujn miajn kontaktojn kun tiu ĉi simpatia skandinavia lando, kiuj komencis en 1929 per mia unua vizito, kaj resaluti multajn geamikojn. La artvitra vazo kun motivoj pri Nils Holgersson restas sur nia hejma tablo ne nur kiel donaco de malmalaj geamikoj, sed kiel multimpresa rememoro pri vere por ni neforgeseblaj tagoj.

- jcl -

INTERNACIA MEDICINA ESPERANTO - KONFERENCO en R U S E, Bulgario /la 15-an - 19-an de julio 1981/

II-an IMEK la subskribinto partoprenis kiel reprezentanto de medicinista sekcio de ĈES. Slovaka delegito estis neurologo D-ro Štefan Grenda kaj krome partoprenis pediatro s-ano Josef Patera el infansanatorio Košumberk-Luže, kiu prezentis dum la konferenco ankaŭ sian infanortopedian prelegon kun diabloj. D-ro J.Hradil prelegis je temo "Ĉu ni progresas?". Lia prelegtemo aperos en la "SANO".

La konferencon, ĉiufanke ekstreme bone organizitan, partoprenis 220 fakuloj el 10 ŝtatoj. 53 diversfakaj medicinistaj, ofte alte specializitaj referaĵoj. Libera tempo eluzita por komunaj ekskursoj okaze de la 1300-a ekzisto de bulgara ŝtato.

Bulgara preso abunde informis pri la konferencaj traktadoj. Esceptsignifa estis akcepto de eksterlandaj delegitoj jam la unuan tagon ĉe bone informita urbestro de Ruse.

UEMA reprezentis ĝia eŭropa sekretario D-ro Imre Ferenczy el Győr.

D-ro J. Hradil

NOVEMBRA KONFERENCARO EN PADERBORN pri kibernetiko kaj komunikado

okazos de la 11-a ĝis la 18-a de novembro 1981. La prelegoj kaj kolokvoj temos - krom pri ingeniarkibernetiko, informpsikologio kaj kibernetika pedagogio - grandparte pri /inter/lingvistiko.

Estos tiucele realigata en la konferencaro

- la 6-a laborkonferenco pri Interlingvistiko en klerigo kaj scienco,
- la 4-a Internacia konferenco pri lingva problemo en la sciencoj,
- la 2-a kolokvo de la laborgrupo "Interlingvistiko" de la Eŭropa Klubo.

Al la ĉiuvesperaj kulturaj aranĝoj, por kiuj respondecas la Eŭropa Klubo, kontribuos i.a. la magiisto Trixini, la baritono Veselin Damjanov kaj la kanzonisto ĵak le Puil. Denove okazos granda distra Eŭropa vespero.

La konferencotizo /DM 60,-/ inkluzivas ĉiujn prelegojn, kulturajn aranĝojn kaj la konferencajn dokumentojn. Membroj de la Eŭropa klubo kaj kontribuantoj al la programo pagos DM 30,-.

La kunordigon de la tuta novembra Paderborna renkontiĝo transprenis la Instituto pri Kibernetiko, Kleinenberger Weg 16 B, D-4790 Paderborn /Tel. 05251-64200 kun automata respondilo/, de kie estos havebla la programo ek de septembro.
Anoncu vin baldaŭ! - Precipe kromaj sciencaj kaj kulturaj programeroj estas bonvenaj.

NOVJORKA URBESTRO PROKLAMIS INTERNACIAN AMIKECAN ESPERANTO-SEMAJNON

Montrante senprecedencan subtenon al la idealo de Esperanto, Edward Koch, Urbestro de Novjorko, solene deklaris la semajnon 12 - 18 julio Internacia Amikeca Esperanto - Semajno.

"Reciprokaj aprezo kaj kolegeco estus plifortigitaj se ekzistis unu generale akceptita neutrala apogo lingvo," skribis la Urbestro. "Esperanto jam elmontris sian facilecon de lernado kaj siajn praktikajn utilecojn en plibonigita komunikado."

La proklamo de la Urbestro rezultis el interveno de anoj de la Laborgrupo de UEA de Unuigintaj Nacioj, kaj ĝi estas ankoraŭ unu ekzemplo de la konsiderinda efikeco de la oficejo de UEA en la eksteraj rilatoj de la Esperanto-movado. Laŭ UEA

proclamation

by order of
Edward Koch
Mayor of the
City of New York

THIS IS TO CERTIFY THAT the Mayor of the City of New York has proclaimed the period from July 12 to July 18, 1978, as International Esperanto Week.



DEK PLEJ GRANDAJ LINGVOJ

La afero de "grandaj lingvoj" dependas de la grandeco de la parolantaroj. Kaj la parolantaroj de lingvoj nombre ne same evoluas. Tial la redaktanto de UN KAJ NI baraktis kun ciferoj el diversaj fontoj kaj faris provizoran konkludon pri la 10 plej grandaj lingvoj denaske parolataj en la mondo en la jaroj 1978 kaj 2000.

En la jaro 1978

1. ĉina	863 milionoj
2. angla	350
3. rusa	262
4. hindia	255
5. hispana	234
6. indonezia	145
7. araba	126
8. portugala	125
9. bengala	123
10. japana	115

En la jaro 2000

1. ĉina	1300 milionoj
2. hispana	420
3. angla	400
4. hindia	370
5. rusa	320
6. portugala	260
7. indonezia	230
8. araba	200
9. bengala	185
10. japana	128

Se ni kalkulas la hindian kaj urduan lingvojn kune, kiuj ambaŭ tre intersimilas sen paroli pri la skribsistemoj, la pozicio de la hindiurdua ĝas en la jaro 1978 la trie plej granda lingvo per 330 milionoj da parolantoj, kaj en la jaro 2000 la due plej granda lingvo per 465 milionoj da parolantoj.

En la jaro 2000, la pozicio de la angla lingvo ne plu okupos la duan lokon, pro la rapida kresko de la nombro de la hispane parolantoj.

EL UN KAJ NI, n-ro 21

el leterkesto

Agrablaj vortoj el Finnlando

Bonorde mi ricevis vian novan libron Rakontoj el unua poŝto kaj rakontoj el la dua poŝto...

Malofte en la manojn venas tiel sprita, samtempe humura kaj psike trafa libro kiel "Rakontoj el unua poŝto kaj rakontoj el la dua poŝto" de Karel Čapek, en impona traduko de J. Vondroušek. Apenaŭ mi povis interrompi la legadon pro mango aŭ noktigo. En Finnlando estas konataj du ĉeĥoslovakaj verkistoj: Karel Čapek kaj Jaroslav Hašek. Antaŭ dek jaroj mi legis en la finna traduko "Salamandromiliton" de Čapek, vera majstraĵo, kiun mi rekomendas traduki, se ne ankoraŭ tradukita, en Esperanton kaj eldoni kiel eble plej baldaŭ, eĉ se la salamandroj adoptis la anglan anstataŭ Esperanto kiel sian mondlingvon. Antaŭ kelkaj monatoj mi legis "Skizoj pri Nederlando" en Esperanto... Kaj nun venis "Rakontoj..." Kiel dirite, mi ĝuis la verkon, ne malplej la tradukon, kiu estas grandega fortostreĉo kaj majstraĵo. Oni povas nur miregi, kiel elaste kaj komforte Esperanto "konduktas" sub la mano de la tradukmajstro! Entute, skrupule kaj zorge farita libro!

J. Jäntti,
Finna Esperanto-Librejo
PL 221
SF-70101 Kuopio 10
Finnlando

STRAKONICE - MĚSTO STARÉ DUDÁCKÉ TRADICE,

VÝROBY FEZŮ A MOTOCYKLŮ ČZ

PŘI NÁVŠTĚVĚ STRAKONIC DOPORUČUJEME K NÁVŠTĚVĚ

RESTAURACI HVĚZDA



- JÍDELNA
- PIVNICE
- BUFET
- SALONKY
- VINÁRNA

BOHATÝ VÝBĚR JÍDEL A NÁPOJŮ, PŘÍJEMNÉ PROSTŘEDÍ,
4x TÝDNĚ HUDEBNÍ VEČERY.

NA SHLEDÁNÍ SE TĚŠÍ ZAMĚSTNANCI RESTAURACE-

HVĚZDA STRAKONICE

1871-1981



110-a DATRAVENO
DE SUKCESA
MAŜINISTA
PRODUKTO



ČKD PRAHA

1871-1981



Jam pli ol kvindek jarojn ekzistas nun tutmonde konata protektata produkta signomarko ČKD. Sed bazo de nuna faka entreprenaro ekzistis antaŭ 110 jaroj. En la jaro 1871 ekfunkciis Unua Ĉeĥomoravia maŝinprodukta fabriko /První českomoravská továrna na stroje/. Dum la tempo la entreprenaro vastiĝis, la produkta programo aliformiĝis kaj larĝiĝis je pliaj maŝinproduktaĵoj kaj elektroteĥnikaj fakoj.

En la jaro 1927 ekfunkciis la kerno de nuna ČKD per kunigo de entreprenoj - Ĉeĥomoravia - Kolben - Danĉ. Kun la larĝiganta produkta programo altiĝis ankaŭ produkta potenco dank' al propraj investaĵoj ŝanĝkonstruaĵoj kaj al envicigo de entreprenoj kun parenca produkta programo.

Krom teĥnikaj kaj komercaj sukcesoj de ČKD antaŭ la Dua mondmilito la fama marko ČKD portis ankaŭ famajn revoluciajn tradiciojn.

La plej grandan evoluon atingis ČKD Praha post la Dua mondmilito. Per la naciigo de industrio en la jaro 1945 laŭplana ekonomio estis bazon por integrita ĉeĥoslovaka ekonomio.

En nuna tempo ČKD Praha prezentas 29 organizaĵajn unuojn, el kiuj 19 estas produktaĵoj, 2 priservaj kaj 8 celfortigaj entreprenoj.

En longtempa evoluo decidsignifa estas integra procedo en la kadro de landoj de KREIH /Konsilantaro de reciproka ekonomia interhelpo - RVHP/, kiun ČKD Praha intensive partoprenas, kiel atestas multaj specialigaj interkonsentoj.

Specialigaj kontraktoj kaj longtempaj komercaj interkonsentoj garantias ne sole longtempan stabiligon de produkta programo, sed ankaŭ socialan certecon por laboruloj de ČKD Praha.

REDAKCE STARTA dostala k dopisu s. Kasjaněnka řadu dopisů, některé souhlasné, některé nesouhlasící. Otiskujeme dopis KE v Praze, který má k dopisu s. Kasjaněnka vážné výhrady.

Redakce Starta znovu upozorňuje, že názory s. Kasjaněnka otiskla jako jeho o s o b n í názory, nikoliv jako názor redakce. Běželo jí spíše o to, aby podnítila zdravou diskusi o klubové činnosti vůbec, o vztahu našich kroužků k mládeži, o vztahu kroužků k ČES a pod. Naprosto pak se nechce redakce zabývat osobními spory a nemíní v žádném případě pořádat "honbu na funkcionáře"; že však situace v některých klubech je neuspokojivá, pražský nevyjímaje, je zřetelné už z poklesu členstva, útlaku mladých apod. Za činnost esperantistů neseme odpovědnost všichni, vedení Svazu i vedení klubů a kroužků: proto budeme i nadále otiskovat kritické hlasy i za cenu toho, že nebudou vždy přesné /autoři skutečně většinou neznají všechny okolnosti a podmínky/, že však budou vyvolávat neklid v příliš stojatých vodách naší činnosti.

V á ž e n á r e d a k c e,
ve Startu č. 2 byl uveřejněn dopis Vladimíra Kasjaněnka jako námět k diskusi. Kasjaněnko mimo jiné kritizuje Klub esperantistů v Praze. Zároveň nás redakce nepřímou vyzývá k vyjádření našeho stanoviska, což bychom samozřejmě udělali i bez tohoto vyzvání. Zde je náš názor.

Záležitost s Ladislavem Kollárem se bohužel stala. Byl jím postižen nejen náš klub. Ale tato věc už byla dávno uzavřena. To by měl Kasjaněnko vědět, když je o klubu tak dobře informován.

Pokud jde o JUDr. Nývltu, pak názory, které mu Kasjaněnko připisuje, rozhodně ani on, ani nikdo z výboru nikdy nezastával.

Rozhodně není pravda, že se klub před lidmi uzavírá, že nejde mezi lidi. Opak je pravdou! Klub využívá řady propagačních skříněk, o které vzorně pečují ss. Kukačka a Brandejs. Vždy na podzim jsou náborovými plakáty ve všech stanicích městské dopravy propagovány kurzy esperanta - ve školním roce 1980/81 proběhly tři kurzy, z nichž více než 30 absolventů se stalo novými členy klubu. Esperanto a činnost klubu propagujeme i jinými prostředky, např. nynější místopředseda klubu Dr. Horský ve svých cestopisných přednáškách pro neesperantskou veřejnost /v Minervě, v agitačních střediscích, v klubech duchodců ap./.

Rovněž je značně přehnané tvrzení, že mladí lidé z klubu odešli. Klub mladé členy má a nyní přišli další z kursů. V pondělí 1. června 1981 byl obnoven samostatný odbor mládeže Klubu esperantistů v Praze, jehož vedoucím se stal Ing. Pečený. Odbor si připravil program činnosti pro podzimní a zimní období.

S. Kasjaněnko přestal být členem klubu již počátkem roku 1980. Z klubu odejít nebyl nikým nucen, k tomu se rozhodl sám a o zrušení členství nás písemně informoval. Je zajímavé, že teprve po roce napsal tento dopis, který redakce Starta tak ochotně uveřejnila bez našeho vědomí a bez konsultace s námi. Víme, že kritizovat je snadné. Avšak kritika založená na polopravdách a nepravdách nikomu nepomůže. Kdo je tak nakloněn myšlence esperantského hnutí, jak o sobě tvrdí s. Kasjaněnko, jedná rozhodně jinak, a nenechá se odradit po nějakém neúspěchu nebo osobní neshodě.

Výbor EKP

SET LANČOV en letero de angla partopreninto /eltiraĵoj/

Estas kondiĉo, se oni meritakiras buĥanan memorigan Premion de la Universitato de Liverpool, ke oni uzu la cent anglajn pundojn por vojaĝi eksterlanden al la internacia Esperanto-kunveno. El larĝa ebleco mi elektis Someran Esperanto-Tendaron en Ĉeĥoslovakio. Ĉar troviĝis plusa semajno inter komenco de mia libertempo kaj komenco de etapo en SET, kiun mi povis partopreni, mi elprovis la fame konatan UEA-delegitan sistemon, ke mi restadu ĉe geesperantistoj survoje el la flughaveno en Prago ĝis SET en surokcidenta moravia Lanĉov.

La rezulto estis korvarma. Mia sperto estas, ke oni renkontas nur afablecon, gentilecon, sincerecon, respekton, entuziasmon, humoron kaj gastamon per la menciita reto!...Aŭdinte sistemon pri almozetantoj-geesperantistoj, kiuj misuzis la sistemon, ofertante nenion krom dankvorton, mi nepre devas rifuzi...

Dua parto de la aventuro estis Tendaro mem. Dum lastaj 28 jaroj geesperantistoj en vigla Klubo Třebíč /sekretaria adreso: Znojemská 1128, CS-674 01 Třebíč, Ĉeĥoslovakio/estras subĉielajn kursojn por ĉiuj venantoj, kaj ĉi-jara vetero estis neniel favora. Malgraŭ tio, du semajnoj, kiujn mi pasigis tie, surborde de Lago Vranov apud Znojmo, estis unu el la plej agrablaj de mia vivo.

Ne estis nur la malmultekosteco, kiu impresis min - estis bonhumoreco. Lernante kaj vivante kune kun 145 ok ĝis okdekjaraj el 6 diversaj landoj - tautiĝante kun ili kaj levigante de ilia entuziasmo por Esperanto, estis profunda sperto, kiu fajrigis gekomencantojn per fervoro kaj reŝargis la bateriojn de malnovaj tankoj similaj al mi, ebligante ke ili reiru fortigitaj al la fronto.

Dum la jaroj ĝe partoprenintoj estis venintaj el eble ĉiu eŭropa lando, ankaŭ el tri aliaj kontinentoj. Mi certas, ke mi sentis min ege bonvena kaj ĉiam memoros kun la plej granda plezuro kaj kontenteco tiujn tri semajnojn, kiujn mi pasigis en Ĉeĥoslovakio parolante nur Esperanton.

David Curtis

Verkita kaj eldonita anglalingve en "Esperanto Teacher" printempe 1981. La originala Esperanto-versio ĉe Universitato de Liverpool.

KRONIKO

PERSONE - Membrino de LG Mělník Eva Balíčková kaj Milan Mareš anoncis la 11.7.sian geedziĝon. Sincerajn gratulojn!

Longjara junulara aganto Jiří V o t r u b e c finis siajn altlernejajn studojn kaj estiĝis la 11.7.maŝiningeniero. La promocian feston ĉeestis ankaŭ lia plurjara persona amiko s-ro

Åke Holmkvist el Stokholmo. Ni esprimas niajn bondeziraĵojn!

Josef J e z b e r a, la plej aĝa membro de EG Mělník mortis la 30-an de julio 83-jara. La familiaj akceptu nian sinceran konsenton.

Lastmomente: Eva Kejmarová - Miroslov Mužák ekde la 7-a aŭg. '81 novgeedzoj! Bonan vivovojojn deziras EG Mělník kaj la Asocio!

RONDETA VIVO

BRNO - Solenoj al la 80-jariĝo de EK Brno, ligitaj kun tradicia renkontigo de esperantistoj el Bratislava kaj Budapeŝto, estis neordinare sukcesaj. Entreprenoj estis bone vizititaj, ĉu la interkona vespero, aŭ la tuttaga ekskurso per busoj al la monumento de paco kaj kastelo en Slavkov kaj Moravia Karsto, same la solena koncerta vespero kaj la dimanĉa kunveno kun parolado kaj salutoj de la gastoj. Partopreno en neniun aranĝon sub 130 personoj. Multnombra partopreno el Budapeŝto, Pollando, Slovakio, Bulgario, unu japanino kaj libanano. La solena koncerto sub artisma gvido de prof. H. Supová - Halířová kaj enkonduko de prof. A. Růžicková-Pavlinová kaj kun solisto de Janáček-opero V. Halíř, koncertkantistino Sonnková, kaj pluaj eminentaj artistoj estis unu el la plej

belaj. En la solena dimanĉa kunveno post bonvenigaj vortoj de reprezentantino de Klub ŝk. a vědy B.V. k-ino Mužíková, parolis la klubestro kaj salutis reprezentantoj de ĉiuj partoprenantaj nacioj. J.V.

HAVÍŘOV - La 4an de jun. prelegis s-ano V. Sládeček pri siaj vizitoj ĉe esper. en GDR, Pollando kaj Slovakio. Ĉie li estis tre amike akceptita. - S-ano Z. Heiser montris fotojn pri sia vizito en Nederlando 1980. - La antaŭferia agadperiodo finiĝis per societa vespero la 25an de jun. en la hejmo de prof. Pastrňák. Partoprenis preskaŭ ĉiuj grupanoj. Ast.

KOLÍN - la 26an de majo 1981 en Kultura domo prelegis s-ano J. Schlumberger pri kongresoj en Rejkjavík kaj Stockholm kun belaj koloraj diablidoj. Ĉeestis multaj gastoj el Poděbrady. Kunvenoj ĉiumarde je la 17a horo en Agit. stredisko, sídl. Kolín 2, Rimavské Soboty. Jel. MELNÍK - pluraj anoj partoprenis pacmarŝojn, dum someraj semajnoj laboraktivas kaj ankaŭ partoprenis SET en Lančov.



Por 66-a UK desegnis P. Bak.



Por ĉiuj 25 vortoj vi pagos 15 Kčs aŭ 5 irpk. Abonantoj el eksterlando turnigu al viaj perantoj pri detalaj informoj!

48-jara altlernejano-jurnalisto korespondos pri E-revuoj por estonaj gazetoj - adreso Elmar Ratassepp, Estonio 202500 VALGA Komsomoli 3-1, SSSR

15-jara knabo kor. kun samaĝuloj. Zsolt Zenényi, BOSTA Kodály Z 23 H - 7811, Hungario.

Kun gejun. kor. Joachim BORUTA, GLIWICE 44-100, Brzozowa 39/8 Pollando

25-jara instruisto kor. tutmonde pri ĉ.t.: Miloš ŠTASTNÝ, 675 57 ROUCHOVANY 46, Ĉeĥoslovakio

Julius BERNÁT, LEHŮTKA 109, 985 11 HALIC, Ĉeĥoslovakio korespondos kun esp. pri bredado de hundoj, kolomboj, papagoj, kunikloj kaj kortbirdaro.

44-jara instruistino kun intereso pri arto, popolarto, PM kaj PI - Margarete SEIFERT, Pf. 37 DDR 2841 PINNAU/Elbe, Post Tripkau

Tadeusz SMYKALSKI, str. Slowackiego 9m 125 PL-42-200 CZĘSTOCHOWA, Pollando: intereso: geometrio, arkitekt., matem., medic., kurac-herboj, fotogr., kuirado.

Dipl. ing. Wolfgang Hofmann, DDR-7024 LEIPZIG, Gästleinstr. 8/95 /42-jara/ pri autismo, sporto kor. kun esp. el Prago.

29-jara Sabine Johl, DDR - 2862 GOLDBERG, John-Brinckmann-Str. 48 kun samaĝuloj el soc. landoj.

24-jara Cornelia Zarezki, DDR-2820 HAGENOW, Feldstr. 64 Pf. 23/52- kun esp. el ĈSSR, Hungario kaj Bulgario.

31-jara Monika Hasse, DDR - 2841 JESOW, Pf. 109 kun ĈSSR, Hungario, Bulgario - posta vizito ebla.

29-jara k.t.m. Brigitte Hann, DDR - 2900 WITTENBERGE, Sandstr. 7.

NOVOSIBIRSKA centra Esperanto - klubo organizas en urba pentraĵgalerio grandan internacian ekspozicion de infandesegnaĵoj laŭ temoj: Mia lando - Ni deziras pacon - Mia ŝatata bildo - kaj aliaj. Surdorse skribu nomon, aĝon, sekson kaj plenan adreson de aŭtoro. Ĉiuj ricevos dankan bildkarton. Aŭtoroj de la plej bonaj desegnaĵoj ricevos specialajn premiojn en rusa stilo. Aĝo 3-15 jaroj. Limdato 15.4.1982, adreso: SU-630099 NOVOSIBIRSKO-99, abonkesto 213, Esperanto-Klubo.

Tre urĝe mi bezonas kiajn ajn vortarojn hispanan - esperantan kaj esperantan - hispanan. Peranton mi rekompencos: Ing. Radim SURŤ, Alšovo n. 691, OSTRAVA - PORUBA, 70800, Ĉeĥoslovakio

Rolf WESER, DDR-7060 LEIPZIG, Weissdornstr. 38 serĉas geamikojn, kiuj sendos kolorajn poŝtkartojn el tuta mondo. Respondo sur poŝtkarto de Leipzig certa!

"Je la nomo de" -Evitinda slavismo

La daŭre pli ofta aperigo de publikaĵoj en Esperanto verkitaj de parolantoj de slavaj lingvoj ne povas ne havi influon sur la Internacien Lingvon. Unu aspekto de tiu procezo estas la enkonduko de slavaj etnonimoj, t.e. esperantigitaj aŭ asimilitaj slavaj vortoj rilatantaj al naciaj apartaĵoj ne facile tradukeblaj en Esperanton. Ekzemplo de tia vorto estas "subotniko" glosita en Bulgara Esperantisto kiel "libervola sabata senpaga laboro". Alia speco de influo estas uzo de Esperantaj vortoj laŭ neinternacia maniero kaj ili estis uzataj tre ofte frue en la historio de la lingvo, eĉ de Zamenhof mem. Tiel Plena Ilustrita Vortaro rimarkas, ke "la Zamenhofs uzo" de muĝli en la senco "sensesence babili" estas evitinda rusismo". La sekvaj citaĵoj ilustras alian slavismon:

- "Teatro je la nomo de Antoni Grabowski el Varsovio"
- "..... la centra regiona biblioteko je la nomo de A.S.Puŝkin..."
- "..... Samarkanda Ŝtata Universitato je la nomo de Aliser Novoj...

La tri ekzempleroj estas ĉerpitaj el numeroj de Budapeŝta Informilo aperintaj en 1980a jaro, sed tiu slavismo ne estas novaĵo. Antaŭ duonjarcento simila esprimo estis uzata en Historio de la Mondolingo de E. Drezen, elrusigita de N.Hohlov kaj N.Nekrasov: "Moskva publika biblioteko de la nomo Lenin"/p.232/.


Tiu ĉi maniero indiki la nomon de institucio aŭ organizaĵo havanta en sia titolo personan nomon estas tipe rusa kaj pola. En la rusa titolo Biblioteka imeni Lenina kaj en la pola Uniwersytet im. Adama Mickiewicza, la vortoj imeni kaj im. signifas "laŭ la nomo de". Unu ekzemplo trovigas en la rusa-Esperanta vortaro de Bokarev: "zavod imeni Kirova", uzino/ je la nomo de/ Kirov". La enkrampigo de "je la nomo de" indikas, ke ĝi ne estas bezonata; Uzino Kirov sufiĉas same kiel Biblioteko Lenin kaj Universitato A.Mickiewicz. Apogo de tio estas la nomformojn en alilingva traduko. Je la anglaj versioj: V.I.Lenin Library kaj Adam Mickiewicz University.

Ĉi-kuntekste estas interese kompari la nomadon de institucioj en Hungario. Kelkfoje estas uzata en oficialej publikaĵoj la latina nomo. Tiu de la Paleontologia Instituto estas Institutum Paleontologicum Universitatis Scientiarum Budapestinensis de Loránd Eötvös Nominatae. La latina vorto nominata, respondanta al rusa imeni, indikas, ke universitato portas nomon de hungara fizikisto. Tamen en la hungara titolo de la universitato, nominata ne estas tradukita. Ĝi estas tute simple Eötvös Loránd Tudományegyetem. Sur kovrilpaĝo de Esperantologiaj Kvaroj ĝi estas esperantigita kiel Universitato Eötvös Loránd. Konklude, la imitado de la slave esprimmaniero nur pezigas la stilon de la esperanta teksto kaj tute ne kontribuas al ĝia semantika enhavo. Estas evidente, ke la loko aŭ organizaĵo portas la nomon de la iniciantinto, fondinto aŭ honorita persono. Male, se oni volas indiki, ke temas pri iea privata biblioteko aŭ propra ĉambro, oni metu la prepozicion "de" antaŭ la persona nomo: la biblioteko de Hector Hodler, la ĉambro de Stefano La Colla.

Bernard Golden.

Horizontale: A. Skrap/i/; havanta aperturon; franca verkistino /Germaine de, 1766-1817/; komenc/i/ moviĝi antaŭen; indiĝena perua reĝ/o/. - B. La unua parto de eldiro de d-ro Humphrey Tonkin, prezidinto de UEA. - C. El aŭstria ĉefurbo devenanta; iukolora pakmaterialo; durada veturilo/ kun artikolo./ - Ĉ. Finaĵo de la aktiva indikativa preterito; natriklorida; piano el la 16a - 18a jarcentoj; gardena arbofrukto; nomo de la 21-a E-a litero. - D. Adverba sufikso de la pasiva prezenca participo; el amfiboleca mineralo farita; malgranda dekpieda markrustulo; antikva romana virvesto; posesivo. - E. Arbaret/o/ en parko; bati per koĉera bezonaĵo; arbedo el kies folioj oni produktas indigon; glava foliarbo/o/; la plej malgranda er/o/ de materio. - F. Encambra litniĉ/o/; gaso ĉirkaŭanta la teron; interna; flavruĝe /neologisme/; tropika fruktarbo. - G. La dua parto de la eldiro. - Ĝ. Tio, kio impresas la flarsenson; partoj de tutaĵo, starantaj inter aliaj partoj; muzikaj sonoj.

Vertikale: 1. Imagi pri plenumo de granda deziro; supra parto/o/ de kolona kapitulo. - 2. Simptomaro dependanta de la insuficenco de la kora sistolo. - 3. Fiktiva monunu/o/ elpensita de R. de Saussure en 1907; portugala valut/o/. - 4. Fortostreĉaj; sistemo de simboloj. - 5. Pasig/i/ tra objekto grandan akvoflumon; komercaĵ/o/. - 6. Treege entuziasmig/i/; salutado ĉe disiro. - 7. Ununur/a/; subite sin montri. - 8. Korala insulo; azia ŝtato/o/. - 9. Satanta solojn; malmola korpompart/o/. - 10. Rilata trinkaĵo; en maniero de iu birdo. - 11. Medikamento/o/ kontraŭ doloro; areo mezurunu/o/. - 12. Malgranda; tia, al kiu estas direktata la pafaĵo. 13. Gentila postulo /kun artikolo/; ruĝiga ŝmink/o/ /neologisme/. - 14. Ano de hebrea kongregacio; kompleto. - 15. Ludkarta emblemo; rilatantaj epidemian malsanon. - 16. Infano; itala popolmangaĵ/o/. - 17. Movigi surradan



objekton; patro de patro. - 18. Mita greka fluganto; membrin/o/.
- 19. Kavaĵo en muro; hejtforno. - 20. Latunaj blovmuzikiloj. -
21. Stenografia sistemo far Rudolf Sprotte /1911/; egipta di/o/.

Helpo: A. Stael. - C. Klaviceño. - D. Jada. - E. Anilo. - F. Anono. - G. Asistolio. - H. Spes/o/. - I. Ruĵ/o/. - J. Eseno. - K. Aoro; Amon/o/.

Adolf Staŭra

Sufiĉas sendi al redakcio la ĝustan tekston de la eldiro, plej malfrue 14 tagojn post ricevo de tiu ĉi n-ro de Starto. Tri solvantoj ricevos libropremiojn.

Libropremioj pro la bona solvo de krucenigmo en STARTO 2/81:

1. RND-ro Frant. Mosek, Praha 4, 3. Dagmar Pištková, Podbořany
2. Karel Štěpánek, Dolní Čermná, 4. Atanas Gaev, Asenovgrad, BG

INFORMOJ EL SEKRETARIEJO

LA KONGESO DE NIA ASOCIO

Laŭ la artikolo 5, alineo 4 de nia Statuto Centra Komitato de ĈEA anoncas al ĉiuj niaj membroj la kunvokon de 4-a kongreso de nia Asocio, kiu okazos en la tagoj 19.-21.3.1982 en Domo de Kulturo Dukla en Pardubice.

Provizora kongresa programo:

- 1/ Raporto pri la agado de CK kaj nuna stato de ĈEA
- 2/ Raporto de CKRK
- 3/ Diskuto pri la prezentitaj materialoj
- 4/ Pridiskuto kaj aprobo de statutsangoj de ĈEA
- 5/ Elekto de nova CK de ĈEA kaj de la prezidantaro
- 6/ Elekto de CKRK
- 7/ Kongresa rezolucio



Unuopaj membroj aŭ lokaj grupoj povas sendi siajn rimarkojn aŭ programajn kompletigojn ĝis fino de decembro al ĈEA.

Ĝoje jam nun ni akceptos eventualajn salutojn kaj bondezirojn el eksterlando. Ili trovos sian lokigon ekspozicie en la kongresa halo.

Elekto de delegitoj de LG devos esti finita kaj anoncita al ĈEA maksimume fine de la nuna jaro. Proportia reprezentado: unu delegito reprezentas 30 asociajn membrojn. LG rajtas elekti la delegiton ankaŭ por komencita nekompleta trideko.

Ĉiuj posedantoj de interesaj kaj teknikaj bonaj fotodokumentoj pri la laboro de nia Asocio /LG, sekcioj, komisionoj/ aŭ pri la interesa kunlaboro kun aliaj organizoj estas petataj prunti la materialojn al nia sekretariejo por ekspozicio en la kongresa halo. Same ni supozas, ke ĉiuj sekcioj kaj komisionoj preparos materialojn por ekspozicii kaj per sia kunlaboro helpos dum la preparlaboroj por perfektigo de la kongreso /kulturaĵ, turismaj, propagandaj kaj organizaj temoj/.

Tiuj, kiuj intencas ĉeesti nian Kongreson kiel gastoj, havos la eblecon aliĝi. Kongreskotizo, kiu enhavas kongresinsignon, kongresmaterialojn, gvidan kaj organizan deĵorhelpon kaj administraciajn elspezojn, mendon de tranoktoj, garantio de manĝo - estos Kčs 95,- por unu persono. Loĝigo kaj manĝeblaĵoj estos en Studenta hejmo. Por komfortemuloj estos rezervitaj nemultaj hotelĉambroj.

ESPERANTO EN IRLANDO estas la titolo de nova informa bulteno de Esper. asocio en Irlando. Ĉiuj intereso pri la vivo kaj la movado en tiu ĉi lando aŭ tiuj, kiuj volas salute bonvenigi la ekziston de nova revuo, uzu la adreson: THE ESPERANTO-ASSOCIATION OF IRELAND, Yoy Davies, 9 Templeogue Wood, D U B L I N 12, Irlando.

HONORA PREZIDANTO DE AE SSR PAVEL ROSA JUBILEAS

Elstara longjara gvidanto de la movado en frata Slovakio, longjara prezidanto de la Asocio, literaturisto kaj eminenta tradukisto en oktobro atingas sian 75-an vivjaron.

Dum longaj jaroj ni kunlaboris ĉu antaŭmilite aŭ pli poste, plurajn jarojn kiel komitatoj ni reprezentis niajn asociojn en UEA dum ĝiaj kongresaj kunsidoj. Eblas plene aserti ke ĉi dum komplikaj situacioj ni ĉiam agorde trovis kontentigajn solvojn, kiuj signifis subtenon por la movado en niaj landoj en vera kunlaboro.

En la nomo de ĈEA, ĝia membraro kaj ankaŭ la nia, gratulante ni premas vian manon, Paŭlo, dezirante al vi por longe ankoraŭ plenan sanon, kontentecon kaj bonfarton!

ĈU VI VENTUROS KUN NI EN BELGUJON?

La 66-a Universala kongreso de Esperanto en Brazilo sukcese finis kaj ni jam komencis niajn preparojn por la sekvanta - 67-a UK, kiu estos en Antverpeno venontjare en la tagoj 24.7 - 1.8.

Ni volas denove aranĝi autobusan karavanveturon tiel, ke la partoprenantoj havu eblecon viziti iun el najbaraj landoj. La prezo de 10-taga ekskurso estos proksimume sama kiel ĉe ekskursoj antaŭaj. Antaŭligojn akceptas nia sekretariejo.

PLUA LITERATURA VESPERO

La 25.5.1981 okazis en kafejo Valdek plua programo de la literatura sekcio de ĈEA. Gastis Josef Vondroušek el Brno.

Jiří Karen bonvenigis gaston kaj ĉeestantojn. La programon kondukis Eva Seemannová. Ŝi rememoris unuajn renkontigojn kun s-ano Vondroušek kaj transiris al lia laboro en la esperantista klubo en Brno kaj al la tradukado el ĉeĥa lingvo en Esperanton. Kiel ekzemplon Eva Seemannová legis el Apokrifoj de Čapek - Goneril, filino de Lear, kaj parton de tradukita fabelo de Čapek.

Sekvis rakontado de la gasto. Satante Esperanton kaj literaturon, li multe legis. Konsciigante la malfacilaĵojn de tradukado, kiam eblas eviti nenian esprimon, li komencis traduki. Pro la antaŭmilita sinteno de Karel Čapek al la proksimiĝanta danĝero, Josef Vondroušek ekŝatis lin. Ni aŭdis pri la laboro de tradukisto, pri grava punkto de tradukado - enfluo de la spirito de la lingvo de aŭtoro.

En la fino de la bela vespero ni eksciis, ke ĵus estis eldonitaj Rakontoj el la unua poŝo kaj rakontoj el la dua poŝo de Karel Čapek en lia traduko.

-ek-

Koncize el la Scienc - tehniko sekcio de ĈEA.

- Estas preparata jura vortaro ĉeĥa - esperanta, botanika vortaro plurlingva, terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj k.a.
- Grava sukceso estas la laboro de s-ano Lubomír Středa, estro de normiga departemento en la nacia entrepreno KARA Trutnov, kiu atingis envicigon de esperantaj terminoj en la Terminaron de peltindustriaĵoj maŝinoj, ekipaĵoj kaj ilaro, eldonita en la Oficejo por normigo kaj mezurado en Praha. Baldaŭ estos eldonita simila normaro: terminaro pri laboroj en la peltindustrio.
- Komence de la nuna jaro UEA malfermis pluan regionan oficejon - en Budapeŝto, por scienca kaj eldona agadoj. Jam nun ĝi vigle laboras.
- Membroj de nia sekcio kontribuas en la preparlaboroj por la orienteŭropa eldono de la Internacia komerca-ekonomika vortaro. Ĉi tiu vortaro estis eldonita origine en 1975 de UEA kun anglaj kaj esperantaj difinoj kaj ekvivalentoj en 7 aliaj okcident-europaj lingvoj. La preparata orient-europa eldono enhavos aldone 8 orient-europajn lingvojn. Preparata estas ankaŭ eldono kun 8 aziaj lingvoj.

LEIPZIG ATENDAS VIN

Leipzig, dua plej granda urbo de GDR, urbo de internaciaj foiroj, kongresoj kaj renkontiĝoj estas ankaŭ urbo kun tradicia kaj vigla esperantista vivo.

De la 12a ĝis la 14a de marto 1982 la Internacia Fira Esperantista Renkontiĝo "IFER '82" kunigos 120 diversnaciajn geesperantistojn. Sub la ĝenerala temo "Goethe - Faust - Leipzig" ni aranĝos por vi atrakciajn programojn, en kiu ankaŭ interkona vespero, librobazaro, urborigardo, dancado ne malestos.

Ne maltrafu vian ŝancon, sed senprokraste petu programon kaj aligilon ĉe Kulturbund der DDR, Organiza Komitato de IFER, DDD - 7010 Leipzig, Käthe-Kollwitz-Strasse 115.

Provizorajn aligilojn per PK akceptas nia Asocio.



restaurace a jídelny

KVALITNÍ UBYTOVACÍ A STRAVOVACÍ SLUŽBY NABÍZÍME V:

HOTEL GRAND kat.B Palackého 3 Prostějov

HOTEL AVION kat.B nám.1 čs.pěšáky 15 Prostějov

HOTEL ROMŽE kat.C Držovice 84 Prostějov

Ve všech hotelích tekoucí teplá voda, ústřední vytápění

NA VAŠI NÁVŠTĚVU SE TĚŠÍ ZEMĚSTNANCI

RESTAURACÍ A JÍDELN PROSTĚJOV

LITERATURNĚ KONKURSON

organizas itala Instituto de Esperanto memore de esperantisto GIANNANTONIO FIORINI.

Temo de la konkurso estas AMUZA PROZAJO sen religiaj, politikaj aŭ kontraŭmoralaj aludoj.

Oni povas partopreni per pluraj verkoj, ĉiu proksimume 30 tajpitaj linioj. La konkursaĵoj estu signitaj per signo aŭ pseŭdonimo; en aparta, fermita koverto estu entenataj la nomo kaj adreso de la aŭtoro.

Oni sendu ĉion al "ITALA INSTITUTO DE ESPERANTO", UNIVERSITATO DE VERONA, VIA DELL'ARTIGLIERE 8, 37131 VERONA, Italio plej laste ĝis la 30 de decembro 1981. Oni povas eldoni ilustraĵojn pri la verkoj. Estos asignitaj unua, dua kaj tria premio, ĉiu konsistanta el 50.000 italaĵoj liroj, plus respektive ora, argenta kaj bronza ŝildoj.

La solvo de krucenigmo el n-ro 3/81: "AMIKO ESTAS TIU, KIU KUN NI ĈION ELTENOS". Libron ricevis: M. Lochman, Mělník - E. Činčerová, Ml. Boleslav, K. Štěpánek, Dolní Cermná, J. Haering, Štěchovice. Al multaj pliaj ni dankas pro intereso.

PRAGO - LENINGRADO

Dum sia privata vizito en Sovetunio sekretario de nia Asocio Zd. Křimský traktis kun kelkaj gravaj reprezentantoj de la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj, inter ili kun docento Simeon Podkaminer, vicprezidanto de la Asocio kaj Vjačeslav Volkov, respondeca sekretario de leningrada filio. La interparoloj temis pri pli proksima kunlaboro, eblecoj de pli efektiva reciproka subtena laboro kaj eluzo de eblecoj, kiujn Esperanto proponas. La komunaj diskutoj helpis pli bonan komprenon de eblecoj de ambau organizaĵoj kaj de iliaj laboreblecoj.

Sur la foto ĉiuj tri reprezentantoj antaŭ la domo de SSOD, kie troviĝas kaj la laboroficejo kaj klubejo de leningrada esperantistoj.



JEŠTĚ NYNÍ JE HEZKY u ČERNÉHO MOŘE

Využijte slevněných sazeb a přihlaste se do Internacia Esperanto-kurseo ve Varně.
Cena za pobyt v říjnu a listopadu Kčs 1750,-. Koupání v termálních bazénech zajištěno.

LETERVESPERO

Okaze de la fondiĝa datreveno de GDR /la 7an de oktobro/ Leipzig-a Laborrondo Esperanto aranĝos letervesperon. Ni petas niajn eksterlandaĵn geamikojn sendi al ni salutkartojn, leterojn kaj materialojn por ekspozicio. Respondo certa! LAK ESPERANTO, PF 713 DDR - 7010 LEIPZIG

1300 jaroj-BULGARIO
Okaze de tiu jubileo la Leipzig-a Laborrondo Esperanto eldonis filatelan tutajon. Porokaza poŝtstampo estos uzata de 1-a ĝis 7-a de septembro en ĉefpoŝtejo 7010 Leipzig. La tutaĵo estos ricevebla ĉe: Librovendistino de LLE Helga BAEU, Jacobstrasse 9
DDR - 7010 L E I P Z I G



Pacmarŝo al Ležáky

La pacmarŝo al Ležáky estas aranĝita sub aŭspicio de multaj organizaĵoj. Dum lastaj tri jaroj ankaŭ sub aŭspicio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio.

Membroj de Esperanto-rondeto de pacdefendantoj ĉe KD ROH DUKLA, Pardubice ankaŭ partoprenis la 21-an de junio la pacmarŝon. Iuj marŝis 50 kilometrojn, aliaj elektis laŭ siaj fizikaj eblecoj pli mallongan distancon.

Poste ĉiuj esperantistoj komune vizitis muzeon en Ležáky, enskribis sian nomon en la memorlibron kaj piete rememoris la 39-an datrevenon de nazi-fiago, la ekstermon de vilaĝo Ležáky kaj de ĝiaj vilaĝanoj en Zámeček, Pardubice.

Per sia ĉeesto je pacmarŝo la esperantistoj dokumentis sian volon batali per ĉiuj fortoj por savi la pacon.

-erk-



Titoloj de novaj eldonaĵoj de nia Asocio dum lasta tempo:

Karel Čapek - Rakontoj el unuĝ poŝo kaj rakontoj el la dua poŝo
Prezo 11,-gld aŭ 27 Kčs

L& České Budějovice-aŭtora kolektivo: Sudbohemiaj manĝoj - fiŝoj
Prezo 2 gld aŭ 5 Kčs

Aŭtoro kolektivo - Meze de Eŭropo /historio de niaj nacioj/
Prezo 5,5 gld aŭ 15 Kčs

Aŭtoro kolektivo - Revuo PACO - eldono de ĉs.MEM-sekcio 1981
Interesuloj eksterlandaj ricevos ĝin senkoste,esperantistoj en ĈSSR ricevos ĝin en la kadro de sia jarabono.Jarabono kostas Kčs 16,-.

Oldřich Kníchal - PANORAMO/Mediteme /-kultura almanako pri elstaraj ĵurnalistoj kaj verkistoj,estinta redaktoro de nia la Starto,kiu nun vivas en Budapeŝto. Prezo de nova almanako 16,-Kčs aŭ 3,-gld

Por la preso estas preparita I-a parto de LERNOLIBRO /por 8-jaraj infanoj, lernantoj de 3-a klaso de bazaj lernejoj/. Aŭtoroj L.Prača kaj ing. Z. Novotný. La lernolibro kun multaj ilustraĵoj kaj laboraj listoj tiel tre bone helpas en la instruado de infanoj, kie ni sentas ĝis nun gravan materialan mankon. Faka pedagogia laboro altiros infanan intereson. La titolo: ESPERANTO I, prezo Kčs 14,-

Dankeme ni ricevis donacojn:

por V j e t n a m i o:

Podnikový výbor ROH UD závodní klub Příbram	Kčs 500,-
Frant.Sedláček, Hartvíkovice	" 100,-

Donacoj por asociaĵoj celoj:

Bejrová Ivana, Velké Opatovice	" 30,-
Stanislav Goliáš, Bzenec	" 30,-
Miloslav Rybín, Liptovský Mikuláš	" 5,-
Rudolf Tomiczek, Karviná - Nové Město	" 5,50

Korekto. En la versoj pri J.Cíchovej /Starto 2/1981,p.31/bv. korekti tajperarojn: "denta" je "tenta" /roz'/. "dikla" je "tikla" /roz'/. Ni aldonas la aŭtoron: A.J. Kubulnieks /USSR/.

STARTO - neprevidelny věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 00 Praha 1, vydávaný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Za obsah tohoto čísla odpovídá PhDr. Jaromír Jermář a Zdenko Křimský. Jazyková kontrola J.Víteček, kresby Pavel Rak, grafická úprava Milen Lebeštes. Tisk zajišťuje Technické ústředí knihoven Praha. Předáno do tisku 6.8.1981. Dohledací pošta Praha 07, snížený poplatek za poštovné povolen ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6.4.1979.

STARTO - presorgeno de ĈEA, Jilská 10, Praha 1, ĈSSR. Aperas sesfoje jare. Jarabono 24,-Kčs aŭ 10,50 gld. Jarabonojn akceptas UEA.



POR MODERNA SOMERA
VESTIĜO DOMO DE MODO

Dumoj
BRATISLAVA

POR VIA KOMFORTO UTILIGU
ALSENDAN SERVON!

KOVOVÉ METALAJ REMIZOJ GARÁŽE

el ŝtala lado - fundamenta farbot-
avolo - duparta pordego - deklina
tegmento - sen planko - ĉfacila mu-
ntado aŭ sur submuro aŭ sur ebe-
na tereno

Longo 4400 mm - prezo 4840,-Kčs
Longo 5300 mm - prezo 5350,-Kčs
Longo 6200 mm - prezo 5830,-Kčs
Largo 3030 mm alto 2450 mm estas
egalaj ĉe ĉiuj tri tipoj.

Je mendo fabrikas kaj dum malon-
ga tempo 1-2 semajnoj liveras

INKLEMO

PRAHA (kooperativo)

Skribajn mendojn sendu al la adre-
so de komerca fako: INKLEMO PRA-
HA, maloobchodní úsek, 190 00 PRAHA
9, Spojovací 11, aŭ telefonu al n-ro 83 09 49.
Persone mendeblaj en Pragaj vendejoj de la
kooperativo. Transporton ni povas certigi. Re-
mizojn ni liveras nur al privatuloj.